

Li Ĝji
Ŭang Ĝuj Kaj Li Ŝjangŝjang



Elĉinigita de LAŬLUM
ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Pekino 1985

e-Librigita de Elerno

junio 2006

Biografia Noto pri la Aŭtoro



Li Ĝji (1922-1980), poeto, el kamparana familio de Tanghe-gubernio, Henan-provinco. Studinte nur unu jaron en mezlernejo, li partoprenis la ĉinan revolucion kaj laboris preskaŭ ses jarojn en la revolucia bazloko de Norda Ŝenŝji. Dum tiu periodo, li kontaktiĝis kun diversaj homoj, aŭdis multajn kortuŝajn revoluciajn historiojn kaj bone konis la pensojn, karakterojn, lingvon kaj literaturajn kaj artajn formojn ŝatatajn de la popolo en tiu regiono, kio metis fundamenton por lia verkado. Je la fino de 1945, li kreis sian eminentan eposon “Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang” laŭ la formo de Xintianyou (ŝintjanjoŭ) speco de popolkanto. Tiu poezia verko kun riĉaj lokaj koloroj estas varme akceptita de vasta legantaro.

En la komenco de la kvindekaj jaroj, Li Ĝji laboris en la petrolo-industria distrikto de Jumen kaj verkis longan eposon “Kanto pri la Vivo” kaj poemaron “Poemaro pri Jumen” pri la vivo kaj laboro de petrolaj laboristoj. Tiuj verkoj estis tiel ŝatataj de la petrolaj laboristoj, ke la aŭtoro estis honore titolita per “Petrola Poeto”. Kaj poste li verkis fabelan eposon “Ŝlosilo de Feliĉo”, kantrakontojn kaj lirikajn poemetojn.

En la meza kaj fina periodoj de la sepdekaj jaroj, Li Ĝji laboris kiel ĉefredaktoro de la literaturaj gazetoj “Poezio” kaj “Popola Literaturo”. En 1979, li estis elektita kiel vicprezidanto de la Ĉina Verkista Asocio.

Li Ĝji estis diligenta kaj fekunda verkisto. Li verkis 29 eposojn, 257 poemetojn kaj multajn novelojn, eseojn, recenzojn kaj aliajn literaturajn verkojn. Li pretiĝis materialon por verki aŭtobiografian romanon, sed bedaŭrinde malsano subite forrabis lian vivon. La poeto forpasis en la 8-a de marto, 1980.

Antaŭparolo

Antaŭ viaj okuloj prezentiĝas jen rakonto en versoj “Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang”, la ĉefverko de poeto Li Ĝji. Ĝi priskribas la ambistorion de paro da mizeraj junaj kamparanoj Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang okazintan ĉirkaŭ la jaro 1930, kun la liberiga batalo de la kamparanoj disvolviĝanta en la regiono de Sanbjan en norda Ŝenŝji-provinco kiel sia historia fono. Realisme ĝi bildigas la kruelan ekspluatadon kaj sangan regadon de la feŭdaj bienuloj al la kamparanoj kaj spegulas la venkan batalon de la lastaj por sia emancipiĝo. La verko sukcese modlis la figurojn de paro da vekigintaj kamparanoj Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang kaj varme prikantas ilian revolucionan spiriton kaj puran amon. Ĝi penetrive prezentas la striktan ligon inter la feliĉa geedziĝo de la geherooj kaj la venko de la popola revolucio, kiun ĝi varme prikantas.

La originalo unue publikiĝis en septembro, 1946. Tiam la revolucia literaturo de Ĉinio eniris novan periodon de sia evoluado, multaj revoluciaj artistoj kaj literaturistoj iris profunde en la popalamasojn, penetris en la socian vivon kaj kreis nombron da brilaj verkoj.”Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang” estas unu el la grandaj fruktoj rikoltitaj. Ĝi markis la komenciĝon de nova stadio de la ĉina moderna poezio, kies ĉefa reprezentanto fariĝis ĝia aŭtoro.

Li Ĝji kaj mi estas samaĝuloj kaj ni aliĝis al la revoluciaj vicoj en sama jaro. En 1938, ni kune faris 25000-li-an “Longa Marŝo” por veni al la rezista bazloko en Tajhang-montaro postfronte de la japanaj agresantoj. Diplomite en la Milita-Politika Universitato por Rezisto kontraŭ la Japana Agreso, ni estis asignitaj al laborpostenoj en iu sama trupo. Tiam ni ambaŭ estis junaj amatoroj de literaturo, kaj li pli inkliniĝis al poezio. La sama kariero kaj sama ŝatokupo faris nin intimaj amikoj. En 1942, li reiris al Jan’an kaj laboradis en Sanbjan-regiono. En tiu loko, li diligente lernadis de la popolamasoj, ĉerpis riĉan nutraĵon el la oceano de popolkantoj kaj kreis tiun ĉi epokfaran eposon, per kio li fariĝis ĉefa pioniro en la historio de la ĉina revolucia poezio. Tiam li aĝis nur 24 jarojn. Kimarkebla estas la folkloro influo al lia ampleksa eposo en tio, ke ĝi estas verkita en la formo de *Xintianyou* (ŝintjanjoŭ, speco de popola liriko en norda Ŝenŝji). La lingvo de la verko aromas per ĉarmo de simpleco kaj multaj trafaj komparoj artisme reliefigis la enhavon. Tuj je sia apero tiu ĉi eposo altiris al si multajn legantojn kaj ricevis varmdjn laŭdojn, kaj ankoraŭ hodiaŭ ne velkis la intereso de la legantoj pri ĝi.

Mi sentas elkoran ĝojon nun, kiam mia estimata kolego Laŭlum esperantigis la ŝatatan eposon per sia poezia plumo kaj ĝin prezentas al la

esperantistaro de la mondo. Mi kredas, ke la legantoj akiros, per la epizodoj priskribitaj en la verko, koncepton pri la suferoj kaj ĝojoj de la ĉina popolo kaj ĝian batalon por fariĝi mastro de sia sorto. Mi kredas ankaŭ, ke la nomo de la poeto, tre bone konata de la ĉina popolo, gravuriĝos en la koro de pli multaj homoj en la mondo.

La poeto forpasis en 1980. La eldono de la Esperanta versio de “Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang” je la 5-a datreveno de lia forpaso, ja estas plej bona memorigo pri nia poeto. Ni prezentas la tradukaĵon kiel bukedon oferatan de la ĉina esperantistaro al kamarado Li Ĝji!

Ŝju Ŝanŝu, 1985

UNUA PARTO

1. SINJORO CUJ KOLEKTAS RENTON

Okazis en la jaro mil-naŭcent-trideka,
en la distrikto Sanbjan*, la event' tragika.

Popolo diris: tie estis tri trezoroj,
povruloj multis, raris riculoj-sinjoroj.

La flava sabl' sin sternis; vaste sen rnezuro,
sed kiu kamp' ne estis havo de riĉulo?

Maloftis pluvo en mil-naŭcent-dudek-naŭa,
la grenplantaĵojn bakis brula varmo daŭra.

Kiel blindul' palp-iras vojon en obskuro,
la malriĉuloj timas ja pro plagaŭguro.

Teruras ne l' komenc' de plago sed la fino,
printempmalsaton sekvan pensis ĉiuj kun timo.

Sur branĉojn homoj grimpi devis post ekstermo
de l' herboj, malaperis ĉie verda ĝermo.

Post forkonsum' de l' verdaj, ili trunkojn mang'is —
arbtrunkojn en farunon ili muel-ŝanĝis.

En la monatoj dua, tria oni ĉerke
Sepultis; poste kuŝis la kadavroj sterke!

En keloj de sinjoro Cuj la Dua ŝimis

* Distrikto kun tri gubernioj nomataj Anbjan, Dingbjan kaj Ĝingbjan, proksima al la Granda Muro en norda Ŝenŝji-provinco.

eĉ greno, do grenmankon tute li ne timis.

Skelete l' malriĉuloj magris pro malsato,
sed Cuj per la mortantoj restis sen kompatato.

Arbegoj ekbruadis sible en tempesto,
riĉulo Cuj fariĝis centfamaliestro.

Abako havas naŭdek unu kalkul-globojn,
ne povis finkalkuli Cuj-ajn ŝafojn, bovojn.

Sur tridek-*li*-a step' kaj sable dudek-*li*-a*,
ĵa kiu grego estis ne havaĵo lia?

El kamentubo fumo flugas en l' aeron.
Sinjoro Cuj posedis ed duon-ĉielon.
Se ĉe l' guberniestro li la langon movis,
eĉ pluvon kaj ventadon li ordoni povis.

Ju pli severas frostoj, des pli fortas vento;
ju pli multiĝas riĉoj, des pli kruel-sento.

La terkulturistaro rikonon ne akiris
pro longa manko de pluvo kaj l' brovojn ekkuntiris.

Grenmanko ja signifas malsato-turmenton,
kaj ankaŭ neblecon pagi al Cuj renton.

Se malsatadon oni povus eĉ elteni,
nepago de rento certe igos Morton veni!

Ŭang Mazi eĉ ne manĝis grajnon dum tri tagoj,
lakeon Cuj alsendis per postulo de pagoj.

* *Li*-o — ĉina mezurunuo de longeco, egala al 1/2 kilometre.

La langon vigligante time Ŭang sin helpis,
kaj ĉiajn bonajn vortojn petajn li elĉerpis:

“Se mi ne povas pagi, plu la vivon tenos;
se ne dum ĉi vivad’, mi brute per vi penos.*”

“Ci ŝuldas al ni renton, monon ankaŭ grenon —
Ĉu ci, hundaĉo, riskos spite vivoprenon?”

Tri pikrigardoj garnis ĉiun lian diron,
post po tri diroj skurĝo faris karnoŝiron.

A1 lup’ kaj tigr’ similis la lake’ barbara,
suferis multe multe Ŭang jam kvindek-jara.

Vundiĝis li tutkorpe, sango ĉie striis.
“Ho, panjo! ... panjo! ... panjo! ” li senĉese kriis.

Sableje jen ostarde** soliĝis de la aro:
pro lia suferado tristis la najbaroj.

“Ja pelton oni portas vintre kontraŭ vento,
ja vivon Ŭang ne devas doni por la rento.

“Laŭvole prenu liajn posedaĵojn, domon,
sed ne pro rentpagigo batmortigi l’ homon!”

Azeno blinda ĵetas sin al fojnamaso.
Homkoron ja ne havas la lakea klaso!

Bastonoj bat-rompiĝis unu post alia,
sang-makulitaj naŭze... ho, kruelo kia!

* La budhistoj kredas, ke post la morto ili renaskiĝos kiel riĉuloj, povruloj,
bestoj k. a. laŭ sia merito.

** Ostardo = sovaĝansero, kiu kutimas vivi are.

Ankoraŭ spiron faris li de l' sunsubiro,
sed sub lunlumo kuŝis li jam morta viro.

Tiriĝis abrotan' kun la radikoj ele.
Sinjoro Cuj la Dua agis tro kruele.

La patron li mortigis, prenis for la idon,
li al Ŭang-familio faris plen-likvidon!

En vintro ĉe l' kreskaĵoj ĝermo ne aperas,
en temp' malnova l' povraj kiel brut' suferas.

II. DUNGITO ŬANG GUJ

La filo de Ŭang Mazi, Ŭang Guj lia nomo,
nur vivis dek tri jarojn sen aldon' de komo.

La bienulo Cuj praktikis ruz-kalkulon,
adoptis la senhejman ĉiam-laborulon.

Li iĝis lia maestr', ne adopt-patro lia,
kaj uzis lin dungito por salajr' nenia.

Denaske la ŝafidoj havas mek-genion,
kaj Ŭang Guj, kvankam juna, bone vidis ĉion.

Eĉ bovo kaj azen' satmanĝas post pen-faro,
sed Ŭang Guj malsatadis dum la sezon-kvaro.

Je la Novjar' abundis ja ĝjaŭzi'* kaj pano,
por Ŭang Guj ŝton-malmolaj ŭoŭoj** nur el brano.

* ĝjaŭzio — ĉina manĝaĵo el faruna pasto farĉita per dispecigita viando aŭ legomo spicita.

** Vaporumita maizpano en formo de konuso kava ĉe la bazo.

Li havis nur peltaĵon por vintrovetero,
kaj ĝin transturne portis ankaŭ en somero.

Aŭtune dum falĉad' ricevis li sen ĉeso,
krom vundoj sur manplat', riproĉojn pro "lanteco".

En vintro Ŝang Guj iris paŝti la lan-bestojn,
portante sur la korpo nur ĉifonajn vestojn.

La manoj kaj piedoj sangis pro frosteco,
la ŭoŭoj malmoliĝis kiel ŝtona peco.

Li volis sin varmigi per brulig' de herbo,
sed neg' ĝin malsekigis, restis li sen helpo.

Astera floro havas kvinon da petaloj,
dungito Vang Guj servis dum kvar tutaj jaroj.

Neĝegoj ja favoras al la tritikplantoj,
Kaj Ŝang Guj ja similis al tritik-kreskantoj.

El frosta vintra tago peza neĝ' furoris,
la karan patron sian Ŝang Guj ekmemoris.

Post morto de 1' bov-patro, la bovid' ekservas,
la patron mortigitan venĝi 1' filo devas.

III. LI ŜJANGŜJANG

Alaŭdo nur alaŭdajn ovojn metas ĉiam.
Ĉe Sijang'ŭan Sinjoro Cuj loĝadis tiam.

Pluvakvoj en rivero fluas kaj miksiĝas.
Loĝadis ĉe Sijang'ŭan riĉaj kaj malriĉaj.

En valo de Sijang'ŭan, de river-spegulo,
vivadis Li Deĵuj, mizera maljunulo.

Kun la blankbarba viro jam kvindekok-jara
vivadis solfilino, floro senkompara.

Li Ŝjangŝjang estis nomo de la solfilino.
Ŝi fraton ne ricevis, mortis la patrino.

Kiel senpluma birdo devas travintradi,
manĝaĵ' kaj vestoj mankis, devis ŝi malsati.

La deksek-jara Ŝangŝjang en laboro bovis,
sed malgraŭ la penad' satmanĝi ŝi ne povis.

Kristala dolĉa kand' en tuko ŝvitodora.
Malriĉa ŝi ja estis, tamen tre bonkora.

Maizaj grajnoj dolĉas ĉiuj je mielo.
Aĝulo Li ja havis koron de anĝelo.

Li ofte l' junan Ŭang Guj tenis je la mano,
kun larmoj al li diris: "Ho, mizer-infano !

"Vi estas tiel juna, pezas jam laboro,
sen patro kaj patrino vivas vi en solo.

"En Gŭan-di-templo* devas loĝi almozulo,
do mia domo estu por vi hejm-angulo."

Se Ŭang Guj libertempis pro pluvad' aŭ vento,
hejtlignon li kolektis por li kun dank sento.

Jen Ŭang Guj havis patron, ankaŭ fratineton;
senhejma birdo trovis por si propran neston.

* Gŭan-di-templo, templo por lojala generalo Guan Junĉan (? —219 p. K.),
troviĝis en multaj ĉinaj vilaĝoj.

IV. KOLEKTO DE SOVAĜLEGOMOJ*

Lilio ruĝa floras kun koloro brila.
Knabino Ŝjangŝjang ĉarmis kun belec' simila.

La granda okulparo brilis kiel kristalo,
simile al ros-perloj viglaj sur herbaro.

Milion mueladas oni en farunon.
De infaneco Ŝjangŝjang amis la kampulon.

Surkampe tamarikoj placas al l' okuloj.
Bonega estas Ŭang Guj inter la junuloj.

Li altas je ses futoj kaj je forto plenas,
en kamplaboroj li duoblan taskon prenas.

Maizo floras ĝuste en la mez-stadio,
de longe Ŭang Guj amis Ŝjangŝjang kun pasio.

Agrablas amokanto — tiklas ja pudoron;
ĉerizoj dolĉas — ja postulas penlaboron.

Ja amon ili sentis unu por l' alia,
hontemo tamen baris al konfes' ilia.

Sur monton Ŭang Guj venis kun sia ŝafaro,
manĝeblajn herbojn plukis Ŝjangŝjang en la valo.

Pelante la ŝafaron fajfis la paŝtano,
el lia buŝ' aŭdiĝis vortoj de amkanto:

“Post la tuttaga pen' mi dormi ne deziras,
maldorme l' amatinon forte mi sopiras.”

* Manĝeblaj herboj estas kutime nomataj de ĉinaj kamparanoj sovaĝ-legomoj.

Jen Ŭang Guj ĉesis paŝi por aŭskulti bone;
aŭdiĝis vale kvazaŭ milda biv' belsone:

“Lilio ruĝa floras en ombriĉa valo.
Ne hastu, se inklinas vi al am-pokalo.”

“Samkiel ganodermo* ĉe l' ŝosea rando,
neniu karas pli ol vi al la amanto! ”

“Se l' arĝenthufaj bonas plej el la ĉevaloj,
vi estas el l' junuloj mia idealo! ”

“Ĉeriza buŝ' kun dentoj blankaj kiel perloj
sagace trompas min per falsaj am-esperoj.

“Se prenis vin riĉul', al vi ne mankus mono.
Kial preferi min, dungiton en ĉifono?”

“Se pipe vi lumigas ĉambron kaj posedas
nur tason da mili', mi vivi kun vi pretas.

“Al mi denaske plaĉas vir' de kamplaboro,
honesto kaj fidel' valoras pli ol oro.”

“Akvomelono verda ruĝas en interno,
memoros viajn vortojn ja mi por eterne.

“En mia kapo svarmas pensoj en konfuzo,
aranĝu rendezuon por korverŝa uzo.”

“En nokto, kiam homoj dormos en trankvilo,
en mian ĉambron venu por interbabilo.

“Ne l' lunon la ĉielo vidos, nur abundon

* Ganodermo (*Ganoderma lucidum*) valora fungo, taŭga drogo kontraŭ pluraj malsanoj.

de steloj. Do atentu, paŝu ne sur hundon!”

V. ARGĜENTAJ DU DOLAROJ

La subiranta suno ĉarme jen rubenis.

Por preni akvon Ŝjangŝjang al la puto venis.

Sitel’ sur tro mallonga ŝnur’ en puton iris
por akv’. Sin-kline Ŝjangŝjang malfacile spiris.

En nigra jak’ lanŝtofa kaj saten-ŝuparo,
sinjoro Cuj la Dua venis el la valo.

Similis lia kapo al terpoma bulo,
pro rido liniigis liaj mus-okuloj.

Li flavajn dentojn montris malfermante l’ buŝon,
malleve li al Ŝjangŝjang faris pinĉe tuŝon:

“Se ĝi tro pezas, do mi helpu vin en parto.
Ĉu decas ke vi vundu l’ manojn de brodarto?”

“Sinjoro Cuj la Dua, virte vi vin tenu.
Ĉu decas ke vi tiel per tuŝaĉ’ min ĝenu?”

“Ne ofendiĝu mia eta belulino,
delonge mi deziras havi vin en sino.

“Mi havas blankan rizon kaj ŝafajan supon,
delonge mi jam volas zorgi vian jupon.

“Se vi vin ligos kun mi, povos vi laŭplaĉe
elekti manĝojn, vestojn ĉiam avantaĝe.”

Indigne kaj honterne Ŝjangŝjang maltrankvilis,
sitelojn vektportante hejmen ŝi ekiris.

Sinjoro Cuj la Dua sekvis sin fripone,

arĝentajn du dolarojn prenis li elzone:

“Jen du arĝentmonerojn mi donacas al vi,
aĉetu floran ŝtofon por novvestojn havi.”

Denaske Ŝjangŝjang havis flam-temperamenton,
kaj kontraŭ la riĉulo fortan malam-senton.

Unue, ke malsatis familio ŝia;
ĉar tuta l' rikoltaĵ' fariĝis rento lia;

kaj due li dungiton Ŭang Guj malfavoris,
tagnokte kiel bovo Ŭang Guj penlaboris.

Ruĝiĝis la knabino kiel granatfloro:
“Ja kiu volas ĉian monon kun fetoro!”

“Bubino, ne rifuzu blinde la favoron,
alie vi tro peze pagos vian sinjoron! ”

Hundaĉo insultita laŭiradas murojn,
sed tamen Cuj plu volis ĉasi seksplezurojn:

“Post rompo de la ŝnur' sitel' en puton falos,
eskapi min vi vane klopodadojn faros.

“Al vermiĉel' tritika sorgon vi preferas,
anstataŭ al mi, ci al Ŭang Guj ame kveras!

“Se Ŭang Guj estas juna, sed mizera nulo,
mi riĉas je arĝento, kvankam nejunulo.

“Faruno tra kribrilo en la keston venas.
La vivon de Ŭang Guj ja miaj manoj tenas.

“Obstakl' en kamentubo, fulgo sur trabaro.
Ricevos Ŭang Guj de mi tagojn de amaro! ”

DUA PARTO

I. REVOLUCIO

En Sanbjan mankis arboj, ŝtonoj estis raraj;
tre malfacile vivis homoj la kamparaj.

Sen nub' sur la ĉielo sekis tro la tero.
Ekŝanĝi L' vojon devis oni en mizero.

De L' gvida ŝaf' dependas ŝafa procesio.
En Norda Ŝenŝji eke viglis Kompartio.

Nomata Liŭ Ĝidan*, gvidanto de L' afero,
standardon ruĝan levis alten en L' aero.

Fajrero en pajlstak' tuj levas incendion.
La flag' de l' malriĉuloj tuj revolucion.

Tra vast' mil-*li*-a fulmis, tondris jen ĉiele.
Ruĝiĝis jen duon' de Norda Ŝenŝji vere.

Volonte bov' purpura faras plugil-tiron.
Revolucii ĉiuj havis jam deziron.

Kampuloj ĝis tagmezo, sed en la vespero
fusil-sur-ŝultre marŝis por kazern-konkero.

Kastelon konkerinte ili disdividis
bienon, grenon, gregojn — ĉion tuj likvidis.

* Liŭ Ĝidan, organizanto kaj gvidanto de la Komunista Partio kaj la Ruĝa Armeo en Norda Ŝenŝji dum la Dua Revolucia Civila Milito (1927-1936). En 1936, li falis en batalo kontraŭ Kuomintanga trupo, kiu intencis malhelpi la Ruĝan Armeon batali kontraŭ la japanaj agresantoj.

La junaj pioniroj kaj ruĝgvardianoj,
ĉiuj nur aĝaj je dek ok aŭ dek naŭ jaroj.

Rapide la virinoj marŝis kiel vento,
kun franĝe kurtaj haroj — sign' de l' nova sento.

Ŝveliĝ' de supra flu', malsupra en ŝlimbano.
Fariĝis kaŝe Ŭang Guj jam ruĝgvardiano.

Li tage paŝtis ŝafojn en la val-medio,
vespere li kunvenis por revolucio.

Post fino de l' kunveno kriis jam la koko,
de dekelk *liojn* for li kuris al hejmloko.

Tuttage li senpaŭze paŝtis la ŝafaron
kaj nokte vighs li sen fermi l' okulparon.

Plezuris lia koro malgraŭ pen' kaj ŝvito,
por la revolucio altis lia spirito.

Ne ĉiuj la kvin fingroj longas tutegale.
Fervoro de Ŭang Guj altegis senkompare.

Alies venĝoflam' atingis montnivelon,
sed tiu de Ŭang Guj superis la ĉielon.

Maljunan patron lian oni batmortigis,
kaj nun por l' amatinon rabi ekintrigis.

Li bove penlaboris tutan jarokvinon,
Sinjoro Cuj ne pagis al li eĉ centimon.

Sinjoro Cuj vigligis la pens-aparaton,
konstruis ĉirkaŭmuron, varbis gardsoldatojn.

Kruelas bienuloj ĉiuj en naturo.

Sinjoro Cuj ja estis ega malbonulo!

Ĉiuj terkulturistoj lin disŝiri volis,
vidinte lin la hundoj grumble tuj ekbojis.

Proponis la amaso al la gerilestro
plej frue jam konkeri Sijang'ŭan pro l' besto.

Malsataj manĝas fabojn sen sufiĉ-kuirado.
Decid': la dudektria de l' jarfin-monato.

La bienulon kaptu en noktmeza horo,
en Sijang'ŭan-on marŝu l' trupo ĉe l' aŭroro.

Post la decido viglis preparado ĉia,
ĉar tuj post morgaŭ estos jam la dudek-tria.

11. ĈU LEVUS SIN LA SUNO EL LA OKCIDENTO ?

Leporoj fuĝas foren, se ĉasatas vulpoj.
Pri la revoluci' ektimis Cuj pro l' kulpoj.

Tagnokte li maldormis, nutris la esperon:
per sola muro bari la Flavan Riveron.

Li ŝtele informserĉis por akir' de scio
pri ĉies partopreno al la Kompartio.

Aŭdinte ke Ŭang Guj kaŝ-agas en ribelo,
sinjoro Cuj la Dua flamis de kolero.

Post paŝt' apenaŭ Ŭang Guj venis en la pordon,
du kanabŝnuroj lige faris al li mordon.

La ŝnuroj vertikale kaj transverse iris,
pendige oni Ŭang Guj-n jen sur trabon tiris.

Kunveni devis ĉiu vilaĝan' ĉe tio,
ke ili vidu l' sekvon de revolucio!

Rompiĝis du bastonoj de fortega bato;
li svenis; reviviĝis per akvo-versado.

Sezam-oleaj lampoj brilis radi-gute.
La vestojn de Ŭang Guj demetis oni tute.

Kun membroj kunligitaj dorsen en sufero,
li pozis kiel anas' naĝanta en rivero.

Sur lia korp', vizaĝo sangaj rojoj fluis,
la sulkoj de l' ŝirvundoj ja animon skuis.

Sinjoro Cuj la Dua en koler' barbaris:
post diu skurĝofrapo li demandon faris:

“Bufaĉo eĉ deziras belan cignon manĝi!
Ĉu vi, malriĉulaĉoj, povus mondon ŝanĝi?”

“Urinu por rigardi spegulbildon cian,
vi musoj povus fari ion eĉ magian! ?”

“Ĉu flirtus neĝ' juke en la firmamento?
Ĉu levus sin la suno el la okcidento? ”

“Ne arogantu hund' maljuna kun kuraĝo,
en ŝtormo estingiĝos ci, olelampaĉo!

“Ne gravas se min solan trafos vivofero,
min sekvos milion' da fratoj de mizero! ”

“Ne fanfaronu, Ŭang Guj, per galimatio,
ja apartenas ni al sama familio.

“Neniam mi mistraktis vin, por verodiro,

simia bubo vi fariĝis juna viro.

“Riveron transirinte vi detruas ponton,
vi kun kreskintaj plumoj perdis dank-volonton.

“Ĉevalo sendifekta eĉ fariĝus drako.
Kredeble vi ekstumblis de sur prudent-trako,

“ja disipul’ kun pent’ valoras pli ol oro,
buĉglavon formetinte budhos vi kun gloro.

“Multnombrajn misojn, kulpojn viajn mi pardonas;
la junaj eraremas, tion mi ja konas.”

“Testud’*maljuna, ĉesu en la serenado,
ne povas vi min trompi per miel’ post bato.

“Vi, la plej maldankema estas mondoskale,
bat-murdis mian patron, uzas min ĉevale.

“Tutjare mi laboris pene en sufero,
vi por jarkvin’ ne pagis eĉ per duon-monero.

“En nokta horo kiam brutoj fojnon maĉis,
jam vekis min el dorm’ hundaĉo ci bojaĉis.

“Nek vestojn nek litaĵon vi sufiĉe donis,
nur du ŝaffelojn mi por la jarkvin’ disponis.

“Vi ĝuas blankan rizon kaj tritikan manĝon,
milia kaĉ’ por mi signifas fest-aranĝon.

“Trioble viajn vortojn garnas pikrigardoj,
el tagotri’ du tagojn trafas min skurĝadoj.

* Testudoviro— kokrito, edzo de adultulino, forta insulto en la ĉina lingvo al viro

“Se estas vi naskito de patrin’ en vero,
ankaŭ mi dek monatojn kuŝis en utero !

“Vi estas homo, same ankaŭ mi en vero,
sed kial vi min traktas kun tia kruelo !

“Mi, Ŭang Guj, kvankam povra, klaran vidon havas,
mi tute bone scias, kio vere pravas.

“Dank’ al revoluci’ liberon mi akiros,
alie tute certe, en inferon iros.

“Se pulo vivon havas, saltas ĝi senĉese.
Kun sola viv’ mi spitas morton se necese.”

Ĉu buĉi aŭ distranĉi, faru vi laŭ volo.
Mi bone scias ja pri via fia koro:

“Post vana fortouzo vi aplikas ruzon,
ke mi perfide faru jam al vi akuzon.

“Tuj ĉesu artifiki jam en ĉi sekundo,
neniam povos vi min fari via hundo.”

Sinjoro Cuj koleris kiel hund’ rabia,
deŝiris sian maskon kun salteg’ furia.

“Nutranton, blinda hund’, ci mordas, ne aŭskultas
admonon koran, sed maldanke min insultas ! ”

Tuj post ordono “Batu!” pluvis skurĝturmentoj.
Eltenis Ŭang Guj l’ draŝon kun grincaĉ’ de l’ dentoj.

Ekblov’ de flava vent’, disgut’ de sabl-pulvoro.
La draŝ’ pikadis glave Ŝjangŝjang je la koro.

Ŝi tremis de doloro, sentis eksvenemon,

kvazaŭ la skurĝado trafus ŝian memon.

Jen la vizag' ruĝiĝis, jen ŝi morte palis,
pro tim' el la okuloj larmoj ne gutfalis.

Por savi la karulon, ŝi rimedon trovis —
tra la pordeg' rapide ŝtele sin elŝovis.

Survoje Ŝjangŝjang pensis dum la rapidado:
“Ĉi-nokte lian vivon jam decidis fato.

“Al Liŭĝjagelaŭ li viziton ofte faras
por kunvenad'. Ĉu tie la geril' ne staras?

“Rapide kuru mi kaj tuj ĝin mi avertos,
alie la karulo sian vivon perdos!”

III. EKFLIRTIS RUĜA FLAGO ĈE SIJANG'ŬAN

Fajfil' de l' gerilestro siblis kaj ne haltis,
pafilon ĉiuj prenis, sur ĉevalon saltis.

Aŭdinte ke Ŭang Guj suferas de torturo,
li tuj ordonis nokte al sav-aventuro:

“Ja Ŭang Guj estas nia bona kamarado,
neniel ni permesos murdon al la frato!”

Dudek ĉevalrajdantoj iris en la fronto,
post ili ruĝgvardia, junpionira rondo.

Fusiloj, revolveroj, lancoj ruĝakvastaj...
Bruadis klaketante ĉevalhufoj hastaj.

Viglegis ĉiu vir' kaj fortis la ĉevalo,
apenaŭ ektagiĝis, ekis la batalo.

Por blanks rapo estas unu sol-radiko.
Kampuloj kaj l' gerilo estas kor-amikoj.

Ekagis ĉiuj kune je la pafosonoj,
kun tranĉilegoj, ĉaspafiloj kaj bastonoj.

Kunagis la internaj homoj kaj eksteraj.
Tumultis en Sijang'ŭan ribeluloj veraj.

Konfuze pafoj, klukoj, bojoj timpan-tuŝis,
la gerilanoj en Sijang'ŭan sin enpuŝis.

Sinjoro Cuj la Dua dormis sur-briklite,
salte leviĝis jen de l' pafoj surprizite.

Post torturad' de Ŭang Guj fumi li deziris,
opian pipon prenis, forte li entiris.

Latuna opi-lampo kun ŝirmilo vitra,
arĝentumita pipo — sed nenio distra:

L' edzin' kaj kromedzinoj ĉiuj lin tedaĉis,
neniu kiel Ŝjangŝjang tiel al li plaĉis.

“La grasa ŝafaj-peco en hundbuŝon falis,
foj-foje por ŝin kapti vane mi batalis.

“Ĉifoje Ŭang Guj certe perdos vivon sian,
do Ŝjangŝjang nepre falos en la manon mian.”

Dum la revado dolĉa eĉ pli ol bombono,
salivo lia fluis jam sur la mentono.

Ĉe la opia lampo li en sonĝon venis
kaj en ĉirkaŭbrakumon li Ŝjangŝjang-on tenis.

La sonĝo tikle dolĉa ne longdaŭron konis,

krakanta pafobruo en ĉirkaŭo sonis.

Je la unua pafilo lia sonĝo haltis,
je l' dua pafilo li de sur la lito saltis.

Lakeojn vekis li por fari sindefendon:
“Tuj fermu la pordegon, grimpu sur tegmenton!

“Kie atakos ili, tuj rebatu tie,
po dek arĝent-dolarojn donos mi premie.”

Pro l' atakant-multeco kaj pafad-intenso,
sinjoro Cuj decidon ŝanĝis en la menso.

Matenaj nuboj fajre tutĉiele ruĝis,
sinjoro Cuj la Dua tra l' postpordo fuĝis.

Leviĝis jen la suno por plena lum-ekspedo
kaj ruĝa flago flirtis de la montpiedo.

La brila suno ĉarmis kiel bela floro.
Gerilo kaj l' povruloj stasis kor' ĉe koro.

Per varma rizosupo kaj vaporaj panoj,
regalon belan ĝuis niaj gerilanoj.

Malligis ili tuj Ŝang Guj-on en savado,
ruĝiĝis l' okulrand' de ĉiu kamarado.

Jam la konscion perdis Ŝang Guj pro doloro.
“Karulo!” vokis Ŝjangŝjang en maldolĉa ploro.

“Se vi pereus, ankaŭ mi ne povus vivi,
malfermu la okulojn por min ree vidi!”

IV. LIBERA GEEDZIĜO

De l' leviĝanta sun' verŝiĝas lumo-riĉo.
Revoluci' alportas tagojn de feliĉo.

Sijang'ŭan kun Cuj estis ja infer' sur tero,
naŭ el dek familioj vivis en mizero.

Forpelis malriĉuloj Cuj-on en ribelo,
Sijang'ŭan jam fariĝis loko en prospero.

Ne povas bruli, brili senolea lampo,
al tia lamp' similas kamparan' sen kampo.

Akiris ĉiuj teron, lamp' radias hele.
Jen la vizaĝ' de ĉiuj ruĝe brilas bele.

Post mango de koptis'* , jen kandon buŝ' entenas.
La manon de l' amata Ŝjangŝjang Ŭang Guj prenas.

Jen egalecon ĝuas viro kaj virino.
Libera geedziĝo — nova vivkutimo.

Tra mil suferoj ili restas par' fidela,
fariĝis nun geedzoj en dolĉec' miela.

Ĉirpadas bela bird' revene al la nesto.
Eklarmis Ŝjangŝjang en la ĉambro de nuptfesto.

* Koptiso (*Coptis chinensis*) herbo kun maldolĉega rizomo uzebla kiel drogo.
Trapasis bonzo Ŝjŭanzang** sepdek du monstrejojn.

La par' travivis ja sennombrajn kor-suferojn.

** Laŭ fama tina romano “Pilgrimo al la Okcidento” bonzo Ŝjŭanzang (602-669 p. K.) devis venki helpe de siai disĉiploj 72 monstrojn, kiuj deziris lin kapti kaj formanĝi, sur lia vojo al la okcidento por akiri sutrojn.

Jen larm' kiel fontakvo senmezure riĉis,
la nova jak' de Ŭang Guj de ĝi malsekiĝis.

“De noktomez' mi jam atendis kokokrion;
ĉi-tagon soifante, perdis mi racion.”

Samtempe Ŝjangŝjang volis plori kaj ekridi,
pri kio paroli ne povis ŝi decidi.

Kaj Ŭang Guj tiel ridis, ke liaj vortoj pendis,
vidante Ŝjangŝjang-n li ankoraŭ sopiron sentis !

De Ŝjangŝjang li ameme ambaŭ manojn prenis,
kun miksaj sentoj penson li esprimi penis:

“Revoluci' la povrajn savis el sufero,
neeblus sen ĝi nia geedziĝ-afero !

“Revolucio savis nin el malespero,
ĝi savis nin kampulojn ĉiujn el mizero.

“La ruĝan flagon ĉiuj devas ŝultroporti,
se l' ruĝa flago falus, ĉiuj devus morti.

“Ĉevalo devas kuri, bovo devas plugi,
revoluci-aferon devas ni konduki.

“Glitigas voj'sur ter', se pluvas en aero.
Falinto devas levi sin mem de la tero.

“La suno leviĝinta ĉiam ruĝe brilas.
Daŭre revolucii kore mi deziras.”

Tri tagojn post la nupto, hejmon aranĝinte,
gerilaniĝis Ŭang Guj jam sin registrinte.

Sur lia kapo tuk' al ŝafstomak' simila;

sur lia ŝultro estis stal-fusilo brila.

Post dek- aŭ dekkvintaga servo, kun permeso
reiris li al Ŝjangŝjang pro revid-promeso.

Post intervid' reiris li al la gerilo,
valfundon Ŝjangŝjang iris kun la kara viro.

“Argilo flava garnas riĉe tiun valon.
El argilpec' ni faru jam figuran paron.

“El ili unu ina, la alia vira,
ambaŭ figuroj estu al ni versimilaj.

“Ni rompu la figurojn, miksu la argilon,
refaru in-figuron kaj argilan viron.

“En la figuro via estas parto mia,
en la figuro mia estas parto via.:

Post figurfaro diris Ŝjangŝjang al l' amato:
“Post kelkaj tagoj estu nia revid-dto.”

TRIA PARTO

1. SINJORO CUJ REVENIS

Subita ekpluvego en seren-vetero:
informon de malĝoj' alportis plum-letero*.

Kun plumleter' senĉese kuris kuriero:
Revenis blankarme'**, donanto de sufero!

Post ĝian dorson kuris la gerilanaro
obee al ordono pri geril-batalo.

Je fajfo Ŭang Guj tuj fusilon surŝultrigis,
ekmarŝis, eĉ ne sian Ŝjangŝjang ĝisrevidis.

Sijang'ŭan nokte aŭdis pri la ve-novaĵo,
matene l' blankarme' aperis en la vilaĝo.

Mienis l' armeanoj ĉiuj malserene,
samkiel kreditor' kondukis kolereme.

De dom' al domo ili serĉis kaj demandis:
"Kun kiu famili' la Ruĝarme' sin fandis?"

"Kiu ricevis bovon, ŝafojn pro l' ribelo?
Kiu fariĝis akirint' de dom' kaj tero?"

Niŭ Siŭa en ribel' ricevis kaverndomon.
Post enketado oni trovis lian nomon.

Sur la pordegon altan de sinjoro Cuj,
lin, per du kanabŝnuroj, oni levis tuj.

* Ekspresa letero kun plumo sur la koverto kiel signo pri urgeco.

** Blank-armeo — reakcia armeo.

Per vergoj kaj dornbranĉoj oni entreprenis
Torturon — lia korpo je sangstrioj plenis!

Diabla kapitano de la blankarmeo
kun brakokruc', larĝigis buŝon je tranĉeo:

“El seka puto akvon vane vi elprenos.
Ĉu al mizerulaĉoj riĉo mem alvenos!

“Jam destinitis al vi sorto de mizero,
vi groteskuloj tamen revas pri libero.

“Kun Ruĝarme-patron', kiu kvazaŭ potencas,
vi, sterkskarab' renversi Tajŝan* nun intencas!”

* Tajŝan estas unu el la kvin famaj pitoreskaj montoj de Ĉinio.

Turmentis ŝnur-ligad', minacis bajoneto,
revenis ĉio de Cuj al lia posedo.

Hundaĉoj vojogvidas, sekvas ilin lupoj.
Revenis al Sijang' ŝan Cuj post tiu trupo.

Kun manbastono kaj en rob' kaj rajdjaketo,
Sinjoro Cuj senŝanĝa restis en aspekto.

De unu dom' li glitis al alia domo:
“Nur revo — ion rabi el sub mia nomo!

“Ribeloj ja okazis jam en antikveco,
do tio estas ne afer' de rara speco.

“Strangaj' ĉiele estas kiel sur la tero,
ĉu l' lunon povus gluti Hundo de l' Ĉielo*?”

* Laŭ Ĉina mito, luna eklipso okazas pro tio ke la Ĉiela Hundo ĝin glutas.

“Ĝi glutas per la faŭk’, ellasas tra l’ postaĵo,
plu brilas hele l’ luno post momenta kaŝo.

“De antikvec’ malpravojn ĉiam prav’ superas,
ribelo de diabloj certe ne prosperas.

“Ja kiu estas vera reĝo laŭ destino?
Sijang’ŭan apartenas al Cuj je la fino.”

Fekaĵon manĝi estas ja natur’ de hundo,
ankoraŭ Cuj deziris Ŝjangŝjang en korfundo.

Li Deĵuj forsendiĝis laŭ Cuj-a ordono.
Sinjoro Cuj alvenis jen al lia domo.

Montrante siajn dentojn ride li mienis:
“Malgranda Ŝjangŝjang kara, vidu, mi revenis.

“Volonte mi forgesos pasintaĵojn plene,
nur se vi iros kun mi hejmen obeeme.

“La edzo ruĝarmeas fuĝis jam al foro,
pro via senedzec’ zorgplenas mia koro.

“Ne restu obstinema; se vi iĝos mia,
vi vivos en feliĉ’ kun bezonaĵo ĉia.”

Kun hont’, indign’ kaj timo funde en la koro,
la kapon Ŝjangŝjang tenis klina sen parolo.

Sinjoro Cuj miskredis, ke ŝi jam konsentis,
plezuran tiklon kaj seksardon li eksentis.

Kaj la solec’ ardigis al li lian sangon,
karese li ekpinĉis al ŝi ŝian vangon.

Samtempe je sinklin’ li kisis ŝian buŝon,

— eĉ en la tag' li volis fari sekskunkuŝon !

Kun brula sent' indigna Ŝjangŝjang tuj elkuris,
dum la rapida kuro ŝi plenvoĉe hurlis.

Kun rido li tuj baris al ŝi la dompordon:
“Jen vi, virino, faras stultan malakordon!”

Dirante ree li al ŝi ekfaris paŝon,
kaj Ŝjangŝjang kraĉis rekte sur lian vizaĝon.

Ŝi piedbatis kaj gratadis sen skrupuloj...
Sur la vizaĝo de Cuj jen du sangmakuloj.

Por vidi la spektaklon venis la najbaroj,
kaj hejmen iris Cuj post la hontigaj feroj.

Irante for Sinjoro Cuj al Ŝjangŝjang diris:
“Jen kian aĉan kaĉon fuŝe vi kuiris !

“Fenestron mi malfermas, ke vi vidu bone:
Vi nepre min obeos, vole aŭ nevole ! ”

II. LA ŜAFSTOMAKA TUKO*

Sinjoro Cuj malhoman faron entreprenis:
Li Deĵuj post forir' neniam hejmrevenis.

La bird' maljuna mortis; estis for la vira.
Por Ŝjangŝjang sola estis vivo malfacila.

Ŝi volis iri serĉi l' edzon de l' gerilo,
lakeoj gardis ŝin, ne eblis do foriro.

* Mantuko blanka pli longa ol larĝa, el kotonaj fadenoj, tiel teksita, ke ĝi havas harojn kiel ŝafstomako. Nordĉiniaj kamparanoj ŝatis ĝin uzi por kovri la kapon.

Deziris Cuj, ke Ŝjangŝjang ŝanĝu sian volon,
donacis li milion kaj tritikpulvoron.

Li petis unun post alia por kunago
persvadi du-trifoje ŝin en ĉiu tago.

Minaco kaj persvad' alternis en apliko,
al Ŝjangŝjang la fidela tute sen efiko.

Trifoje ĉiutage plendis ŝia ploro,
fandiĝus de l' cagreno ja eĉ ŝtona koro.

Se iu larmas, certe lin ĉagreno regas,
de larm' la ŝafstomaka tuko gut-malsekas.

La ŝafstomaka tuko longas dekkvin-cole.
Viŝinte for la larmojn, ploris ŝi denove.

Post dorso de la domo, sur la ter-altaĵo,
ŝi vidis la sablejon ekster la vilaĝo.

Montetoj sablaj altis, male l' fundo vala,
sed kie ja troviĝis ŝia viro kara? !

En fronto de la domo unu ulmo staris.
Ĝi, kvankam ne tre alta, dikradike raris.

Ŝi kaptis jen la ulmon, skuis foj-refoje:
“Pretigu ponton, ke mi iru al li ĝoje!”

Vidiĝis tra l' fenestro jen sovaganseroj*.
Ne-kalkuleblis ja de Ŝjangŝjang la suferoj.

“Laŭdire l' birdo estas kurier' bonfara,
bonvolu miajn vortojn portu al la kara:

“Je via forvojaĝ’ burĝoni l’ arboj penis;
forfalis la folioj, sed vi ne revenis !

“Se haltas rajdceval’, vigligu vipe l’ fortojn;
se vi ne povas veni, sendu al mi vortojn:

“Masoni per sol-ŝtono kaj du brikopecoj —
Vi scias, kiom multas miaj malfacilecoj!?

“Nubaron sur ĉiel’ konfuzis forta vento.
Disigis nin geedzojn mava incidento.
“

El la greneroj pizo estas la plej ronda,
plej kompatindas ni el la popolo monda.

“Plej glatas el grensemoj grajnoj de milio,
plej trista paro estas ni en la socio !

“Vin sopirante perdis mi la apetiton,
kaj fajro en la kor’ estiĝis lip-vezikojn.

“Mili’ en suna val’, mili’ en ombra valo.
Pensado pri vi ĉie ekas kun larmfalo !

“Je pren’ de bovlo min sopiro tuj englutas,
kaj larmoj el l’ okuloj en ĝin gutas, gutas.

“Mi pensas pri vi, sen lamp-lumo, de vespero
ĝis frua horo antaŭ matenruĝ-apero.

“Dum tuta nokt’ neblas fermi la okulojn,
sur la briklit’ mi pentras de vi la figuron.

“Karulo, tuj alvenu mian vivon savi,

* Sovaĝansero estas rigardata de Ĉinoj kiel simbola transportanto de leteroj kaj informoj.

alie vi ne povus vivan min rehavi.

“Ĉagrenon, se mi mortos, vi ne devas havi —
ĉu viva ĉu mortinta mi fidelos al vi.

“Ĉevalon altan garnas taŭge ĝiaj brido
kaj piedingoĵ, sekvos vin mia spirito.”

Onklino Liŭ ja estas hom’ kun bona koro.
ŝi akompanis Ŝjangŝjang en malĝoja horo.

Konsolis la knabinon ŝi en temp’ libera:
“Ne dronu en ĉagreno, ho, infan’ mizera!”

Revenos iutage niaj gerilanoj
kaj venĝos vin kaj ĉiujn kontraŭ la tiranoj.

“Ni kaptos Cuj vivantan, ligos lin per ŝnuro,
balaos for la aĉulojn ĉiujn ĝis plenpuro! ”

Ja naŭdek eĝojn havas tridek fagopiraj
greneroj, malsaniĝis Ŝjangŝjang pro sopiroj.

Flaviĝas verdaj plantoj kaŭze de pluv-manko,
de Ŝjangŝjang malgrasega palis ambaŭ vangoj.

Ŝi faris ŝuo-paron malgraŭ la malsano,
kun larm’, al onjo Liŭ ŝi donis en la manojn:

“Onklino, pro la ŝuoj peton mi prezentu:
post mia morto nepre al li ilin sendu.

“Transdonu l’ suojn al li kun la jena vorto:
Jam ne plu ŝuoj de mi por lia surporto! ”

III. KUNIĜO DE L' GEEDZOJ

Jen bienulo Cuj ekflamis de kolero:

“Bubin’ honorrifuza, damnon al infero!”

Kun nigra koro li, kruela kiel lupoj,
forrabis Ŝjangŝjang fine per lakea grupo.

Nuptofesteno riĉa je l’ fiksita dato:
la dudek-dua tago de l’ jarfin-monato.

Por la kromedzinig’ la lakear’ rapidis,
de l’ festen-tabloj nur la oficiroj sidis.

Ricevis la soldatoj eĉ po kvindek cendojn,
tostadis, vetludadis, faris kri-komentojn.

En larmoj dronis Ŝjangŝjang pro senĉesa ploro,
memore pri l’ karulo, sangis ŝia koro.

Ruĝa silkjak’ kaj verda saten-pantalono
perforte surmetiĝis malgraŭ ŝia opono.

Kun larmoj de amaro Ŝjangŝjang Cuj-n insultas:
“Kial ci ne kun cia olda panj’ adultas !

“Iutage realigu mi la fortan volon:
ponardo plej profunde piku cian koron!”

Tamen ŝajnis Cuj, ke li ne aŭdis tion,
kuŝante sur briklito fumis li opion.

Fuminte Cuj sin turnis al drinkad’ pro l’ nupto,
tumultis ĉiuj brue kvazaŭ hunda lukto.

Tostadis reciproke ili en kontento,
de brando plezuriĝis ĉies hunda ventro.

Ĉiuj ĝojkriis al Cuj: “Gratulon! Gratulon!”
kvazaŭ infan’ salutis propran plej-karulon.

Jen bienulo Cuj ekdiris kun rideto:
“Pardonon, se mizera estas la bankedo.

“Nur dank’ al via helpo povas mi festeni,
alie mi ne povus kromedzinon preni.

“Ŝi devus servi al vi dum tostado dece,
ĉar vi ja klopodadis pene kaj senĉese.

“Sed ŝi obstina restas, plori ŝi ne ĉesas,
do vin ŝi danku poste, tion mi promesas.”

Naskiĝis ŝi virino sen aspiro granda,
preferas ŝi povrulon al mi monhavanta.

“Mizera Ŭang Guj penis kun mi konkurenci,
sed brako al femuro devas riverenci.

“Ja min kaj ŝin en paron la ĉielo ligis,
neniu ŝin el miaj manoj eskapigis.

“Ja grasajn ŝafojn donas ĉiam riĉa stalo,
povruloj ja sukcesas en nenia faro.

“Ja ĉiam restos vera mia argumento:
Ĉu levus sin la suno el la okcidento?!”

Sen gvat’ de l’ vilaĝfino ili bru-festenis —
jen gerilanoj ŝtele en-vilaĝen venis !

Aŭdiĝis hura-krioj kiam pafoj krakis,
jen niaj gerilanoj pune reatakis !

Ĉevale rajdis ĉiuj ili kun pafilo
en siaj manoj — ho, potencas la gerilo!

Glavegoj, sabroj, lancoj... oldaj bataliloj
uzataj kune kun pistoloj kaj fusiloj.

Neniu blanksoldato ekbatali volis,
tuj kapitulacantojn ili prete rolis.

En la vilaĝo ĉie torĉoj hele brilis.
“Bonvenon, gerilanoj! ” la popol’ jubilis.

Paniko l’ oficiojn sen-soldatajn tuŝis,
kaj l’ terurita Cuj sin sub terlito* puŝis.

Forfuĝis la rotestro, plotonestroj ja ne,
kaj oni ilin ĉiujn ligis man-kun-mane.

Sinjoro Cuj la Dua molis kiel muko,
jen estis ŝnurligita kapon al la pugo.

Trans muron la rotestro saltis jen eksteren.
Subite lin Niŭ Siŭa kaptis, premis teren.;

Aŭdinte la pafadon, Ŝjangŝjang ridmienis.
Ŝi pensas en si: Certe la geril’ revenis.
Pro ĝojo de feliĉo viglis la spirito,
sin levis Ŝjangŝjang, saltis de sur la briklito.

Ŝi iris per rapidaj paŝoj de hasteco,
por vidi kie estas ŝia kara edzo.

De l’ gerilestro Ŭang Guj forpermesan vorton
ricevis, por ŝin serĉi venis en la korton.

* Terlito—lito masonita el adoboj, hejtebla en vintro tra truo, en kiu oni povas
sin kaŝi okaze de danĝero.

De torĉoj helis tuta l' kort' de fin' al fino.
Sed kie ja troviĝas lia karulino?

En malproksim' vidiĝis bela novedzino,
en verda pantalon' kaj jak' de karmezino.

Ĉeval' iritan vojon konas en perfekto.
La edzon Ŝjangŝjang ja rekonis laŭ aspekto:

“Jen ŝafstomaka tuko ĉirkaŭ lia kolo —
kiu alia, se ne la amat' de l' koro!”

Je la renkont' la manojn ili interpretis,
paroli, ridi volis, sed nur vane penis.

Ja vortoj en la koro svarmis cent-milope,
sed kvazaŭ tuk' la buŝon plene baris ŝtope.
Post longa baraktado Ŭang Guj diris vorton:
“Ni zorgis revolucion, kaj ĝi nian sorton! ”

En decembro de 1945, Sanbjan